



**Revolucia rezulto
en ĝenerala elekto de Japanio**

Memore pri balta vojo

**Masakro
en Burundo**



Ĉu vi jam legis?



Plej furoris en 2008

1. Ziko van Dijk: La Asocio
2. Wendy Heller: Lidia
3. Stephan Lang: La talpočasisto
4. La Jaro 2009
5. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
6. Edwin de Kock: Sub fremdaj ĉielo
7. Katalin Kovacs: Poŝamiko
8. Petro De Smedt: Zakwoordenboekje/
Poŝvortareto Esperanto-Nederlands-Esperanto
9. Lena Karpunina: Neokazinta amo
10. Ziko van Dijk: Informado praktike
11. Stefan MacGill: Nemave edifi
12. Ludoviko Zamenhof: Fundamento
de Esperanto (hungara)
13. Alberto Fernandez: Kalejdoscopa rememoro
14. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo
15. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni (2a eldono)
16. Sen Rodin: Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj
rakontoj
17. Ilustrita oficiala radikaro
18. Petro De Smedt: Nederlands Esperanto
Nederlands
19. Marcus Sikosek: Esperanto sen mitoj
20. Hergé: Tinĉjo en Tibeto
21. Anna Löwenstein: Morto de artisto
22. Hergé: La Nigra insulo
23. Sagao de Njal
24. Sten Johansson: Krimo de Katrina
25. Andrzej Pettyn: Humuro laŭ la skota
maniero

La jenaj 25 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2008.

Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en www.retbuto.net, sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Revolucia rezulto

Fine de aŭgusto okazis ĝenerala elekto al la japana ĉambro de reprezentantoj. Kiel antaŭvidite, triumfis la Demokrata Partio (DP) super la reganta Liberala Demokrata Partio (LDP). Se DP plenumos siajn promesojn, ĝi ŝanĝos la socion kaj la nacion. Tial oni povos nomi ĝian grandan venkon revolucio.



8

Ponto por dialogo

Balotis 41 % de la voĉdonrajta loĝantaro de la kataluna urbeto Arenys de Munt responde al la demando: „Ĉu vi konsentas, ke Katalunio fariĝu plenrajta ŝtato sendependa, demokratia kaj socia ene de Eŭropa Unio?” El tiuj, kiuj voĉdonis, respondis 96,18 % favore al sendependeco de Katalunio disde Hispanio.



9

Hejmen - en ĉerko

Post atako en februaro, kiam pereis 11 soldatoj burundaj, mortis en septembro en Somalio pliaj 21 pactrupanoj de la Afrika Unio (AMI-SOM). La islama ribelantaro Shebab konsideras la soldatojn invadintoj. Dum la atako estis vunditaj 40 trupanoj el Somalio, Ugando kaj Burundo, inkluzive de la AMISOM-ĉefo, generalo Nathan Mugisha.



11

Vojo al demokratio

Antaŭ 20 jaroj la detruita berlina muro signalis la finon de la malvarma milito en Eŭropo. Tamen, du monatojn antaŭe, en aŭgusto 1989, ĉirkaŭ du milionoj da litovoj, latvoj kaj estonoj staris homĉene inter Vilniuso, Rigo kaj Talino je distanco de ĉirkaŭ 600 km.



12

politiko

Japanio	8
Rezulto revolucia	
Katalunio	9
Ponto por dialogo	
Albanio	10
Ĉu septembro - aŭ aprilo?	
Opinio	10
Planoj kaj prognozoj	
Burundo	11
Hejmen - en ĉerko	

moderna vivo

Baltio	12
Vojo al demokratio	
Japanio	14
Rifuĝintoj pro domperdo	
Sporto	15
Nokaŭto!	
Litovio	15
Floras la prezidanto	
Songoj	16
Ŝlosila teorio	

turismo

Francio	17
Fortikaĵurbo Gerando	

medio

Bulgario	20
Obstrukco de la surstrata cirkulado	
Papili-nombrado	21
Kardopapilio donas esperon	

libroj

Esperantigante rifuĝintojn el Afganio	20
Plia heroo por Esperantujo	21

novelo

La mistera nokto	24
-------------------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al rebtutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Point Tas 7004, Australia.
Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140,
2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio
de Britio, Esperanto House, Station Road,
Barlston, STROKE-ON-TRENT, ST12 9DE,
Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi
- **Francna:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
► Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering,
(Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
► Hans Dietrich Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
► Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de
Pensions 2100-0461-90-0200055053).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3 III. l. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
Crescent, Christchurch 8025.
Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- **Ruslandaj:**
► Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
► Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zcirić@eunet.yu
- **Slovenaj kaj Slovakaj:**
► Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
- **Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,**
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
► Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.
esperanto@telia.com.
- **Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.**
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluwin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Gazet-eraroj



Supozeble ankaŭ en via kutima gazeto oftigis eraroj dum la pasintaj jar(dek)oj. Mi mem malkovras pli kaj pli multajn eĉ en renoma tutlanda ĵurnalo de Germanio, kiu ĉiam fieris pri sia senerara lingvaĵo. La problemoj estas, ke eldonejoj maldungis ĉiujn reviziantojn, ĉar komputilaj korektoprogramoj estas multe malpli kostaj ol homfortoj. Sed eĉ plej ampleksa komputila programo ne kapablas malkovri ĉiujn lingvajn erarojn.

Ankaŭ en nia revuo aperas eraroj, kvankam ni ne rezignis pri la lukso de homaj reviziantoj. Kiam antaŭ kelka tempo atentema leganto rimarkis plurajn nekutimajn erarojn en diversaj artikoloj, estiĝis diskutado inter la kunlaborantoj, kiel oni povus plibonigi nian sistemon de erar-serĉado. La principo estas, ke ne nur aŭtoroj kaj redaktoroj atentigas pri malĝustaj vortoj kaj gramatikaj, sed ke normale minimume du reviziantoj legas manuskripton kaj atentigas la redakcian sekretarion pri eraroj, tiel ke antaŭ enpaĝigo li povas elsarki ilin. Se do tiom da homoj provlegas, kial tamen aperas eraroj? Simple ĉar homoj estas eraremaj – nur la katolika papo estas memdifine neeraripova ...

Aliflanke, oni ne povas aserti, ke multiĝis eraroj en nia magazino dum la jaroj. Sed tute certe eĉ kun plej bona sistemo de kontrolado

ni ne povos trovi ĉiujn erarojn. Krome ni ne volas ŝteli de iuj el vi la hobion de erar-ĉasado. Eble vi memoras, ke antaŭ longa tempo la „lingvopapo“ Bernard Golden regule informis niajn legantojn pri la eraroj, kiujn li trovis en antaŭa numero. Liaj artikoloj, spicitaj per malicetaj komentoj, estis amuza legaĵo. Mi mem estas tre malbona revizianto; precipe en miaj propraj artikoloj mi ne facile trovas la erarojn, kaj ankoraŭ nun mi preferas presi manuskripton por revizii ĝin sur papero. Kun teksto sur la ekrano mi ĉiam havas problemojn. Sed tio probable estas nur mia persona malfacilaĵo. Post multjara redakta laboro kun papero mi ne kapablas forlasi tiun kutimon, ne plene fidante al komputilaj ekranoj. Kiel ajn, mi esperas, ke la reviziantoj trovas ankaŭ estonte tiujn erarojn, kiujn mi pretervidis.

Sincere via

Stefan Maul

Stefan Maul



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinktitaj en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la konkerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librecozencojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Akcepti kaj sciencon kaj Biblion

En la artikolo *Supervivo de plej taŭga teorio* (MONATO 2009/8-9, p. 22-24) oni asertas, ke la teorio de evolucio estas kontraŭata, ĉar ĝi „kontraŭstaras al la tiel nomata kreismo, la biblia koncepto, laŭ kiu nia universo estis kreata de Dio dum ses tagoj antaŭ ĉirkaŭ 6000 jaroj”.

Tio suspektigas, ke Darwin estis engaĝita kontraŭstari la aserton pri la ses tagoj kaj la ses miloj da jaroj. Ĉu eblas pensi, ke Darwin naive ne sciis, ke „la ses tagoj” (kaj ĉirkaŭaĵoj) estas, jam de longa tempo, interpretitaj kiel mita kadro por transdoni la koncepton de la dia kredo? Krome, ĉu vere Darwin konstante distancigis de la koncepto de kreismo?

Estas, certe, iuj novdarwinismaj nantoj de kreismo; pli precize, tiuj ĉi kontraŭstaras la fundamentistajn kreistojn, laŭ kiuj Dio, post la komenca kredo, daŭrigas interveni, de tempo al tempo, por die helpi la evolucio. Ne, do, pro la supremenciitaj motivoj la teorio de evolucio estas kontraŭata. Kutime dikredantaj sciencistoj akceptas kaj la science pruvitan evolucio kaj la tradician biblian kreismon.

Armando ZECCHIN
Italio

Anagramo

Mi elpensis la jenan anagramon de „Esperanto lingvo internacia”: *Tirani ne venigos la terpacan*. Tio ne rilatas al Esperanto, sed eble alia leganto trovos pli taŭgan.

Vilhelmo ROWE
Britio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

EU perdas enspezojn

Por la somera sezono Kroatio enlasas rusianojn sen vizoj, sed sufiĉas rigardi la mapon por kompreni, ke ne eblas sen vizoj (transitaj aŭ ŝengenaj) traveturi sur-tere landojn kiuj baras, barieras la eventualan itineron: Hungario, Rumanio, Slovakio, Pollando. Nur aere eblas trafi Kroation sen vizoj, sed vojaĝi aere estas sufiĉe koste por ni, la fervojistoj, kiuj fervoje ja havas privilegiojn je biletoj ĝis almenaŭ la eksa sovetia limo, do ĝis la supre menciitaj landoj.

El niaj ses vojaĝoj tra eŭropaj landoj ni nur dufoje petis invitilojn por ekhavi vizojn (unue italan, due ŝengenajn) de francino. Mi nun turnis min al turisma buroo por aĉeti turisman vizon al Kroatio, sed la buroo vendas ĝin nur kune kun loĝado (ne malpli ol sep-taga) en iu gastejo en la lando.

Jen, mi devas nun solvi la problemon kun la vizoj. Mi persone opinias, ke EU perdas multajn enspezojn pro la viza reĝimo kun Rusio, ĉar multegaj rusianoj

pro tio preferas ripozi en Turkio, Egiptio aŭ Tajlando, kie oni donas (vendas) la vizojn tuj en flughaveno aŭ ĉelime.

Sergeo PAŬOMOV
Rusio

Kio estas „distanco”?

Kiam mi estis juna, homoj veturis per ŝipo – grava trafikilo en mia regiono, kvankam malrapida. Per ŝipo mia patrino vizitis siajn gepatrojn, tamen malofte, ĉar ili loĝis tro longe for. Nepris 20 horoj da veturado: longa vojaĝo, kaj longa distanco, laŭ mia patrino.

Tamen, pro la rapida evoluo de la ĉina ekonomio estas konstruitaj lastatempe ŝoseoj. Aŭtojn oni aĉetas: nun mi atingas per aŭto la hejmlokon de mia patrino ene de du horoj. Mia filineto opinias la distancon mallonga. Ĉu do la distanco estas longa aŭ ne? Mi ne scias.

Xu Jinming/pg
Ĉinio

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponojn nun ĉe
MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Fendita nacio

de Stefan MAUL

Kiam antaŭ 140 jaroj konservativa germana kanceliero Otto von Bismarck per leĝo enkondukis ŝtatan socialan asekuron, li tion faris ne nur por helpi malriĉajn civitanojn, sed ankaŭ por sufoki socialisman movadon. Tio tamen ne funkciis, ĉar la laboristaro spite al la ŝtata bonfaro preferis socialismon kaj socialdemokratojn. Sed la pionira faro de Bismarck efikis, ke hodiaŭ en praktike ĉiuj eŭropaj kaj multaj aliaj demokrataj ŝtatoj pli-malpli bone funkcias tia sociala asekuro. Ties tri plej gravaj komponantoj estas sanasekuro, pensia kaso kaj asekuro kontraŭ senlaboreco. Ili garantias, ke ĉiu civitano en kazo de bezono ricevas la necesan helpon kaj ne devas pagi ĉion el propra poŝo. Kompreneble tio validas precipe por malriĉuloj. La plej grava el la tri komponantoj estas la sanasekuro, ĉar apenaŭ estas homoj, kiuj neniam malsaniĝas.

Ne normala en Usono

Sed kio estas tute normala en Eŭropo kaj multaj aliaj industriaj landoj, tio tute ne estas normala en la plej riĉa demokratio Usono. Tie ne ekzistas ŝtata sanasekuro, nur privata. Tial intertempe 47 milionoj homoj vivas sen sanasekuro, kaj tio mortigas: ĉiujare 18 000 viroj, virinoj kaj infanoj mortas en Usono, ĉar sen protekto per asekuro ili ne povas viziti kuraciston. Statistike tio signifas, ke ĉiun horon mortas du malriĉuloj.

Neniu eŭropa lando politike eltenus tiajn ciferojn, kaj eŭropanoj komplete malkomprene observas la scenojn de intercivitana „milito” en Usono, kiu komenciĝis kiam prezidanto Barack Obama anoncis siajn planojn por ŝtata sanasekuro. Mi imagas, kio okazus en Germanio, se en mia urbo civitanoj venus kun pafiloj al partikunveno, se ili kriante insultus deputitojn pro la sanasekuro jen kiel „naziojn”, jen kiel „komunistojn”. Oni karakteri-

zus tiajn protestojn kiel absurdajn kaj frenezajn.

Kia karaktero?

Evidente la usona socio estas fendita, profunde fendita. Unuflanke staras partianoj de Obama („demokratoj”, aliflanke adeptoj de „republikanoj”), kiuj rigore rifuzas ĉian ŝtatan asekuron, per ĉiuj rimedoj. Ankaŭ ne multe utilis, ke Obama dum parolado antaŭ la kongreso (parlamento) citis el letero de la ĵus mortinta Ted Kennedy [kénédi], kiu estis demokrat-partia politikisto agnoskita de la tuta nacio. Estas „la granda, nekompletigita afero de nia socio”, li skribis, finfine garantii al ĉiu civitano en la plej riĉa lando de la mondo rajton je sanprotekto. Temas pri „fundamentaj principoj de justeco”, skribis Kennedy, fine eĉ pri „la karaktero de nia lando”.

Kia estas la usona karaktero? Kiom solidara volas esti tiu nacio, kiom da ŝtateco bezonas lando, kies fondomitoj rakontas pri senlima libereco kaj pri heroo, daŭre fiero individuismo? Usonanoj terure timas tro potenca ŝtaton, kion eŭropanoj absolute ne komprenas. Certe, multaj enmigrintoj venis al Ameriko pro politika (ofte ankaŭ religia) subpremo en siaj (eŭropaj) hejmlandoj kaj revis pri la lando de senfinaj ebloj, pri grandioza libereco sen iu ajn subpremo. La dogmo de Usono estis kaj estas: ĉiu, kiu volas, povas vivi libere kaj bone, sen influo de la ŝtato, nur per la propra individua forto.

Homa bezono

Sed post pluraj jarcentoj tiu usona revo ne plu estas tiom realisma. La mondo kaj la socioj ŝanĝiĝis konsiderinde,



JAVIER SÁNCHEZ MONEDERO

en moderna kompleksa industri-lando ne ĉiu individuo povas mem helpi sin; tro komplikaj estas la cirkonstancoj. Sen ŝtataj intervenoj tiaj socioj facile kolapsus. Tion evitis eŭropanoj per koncernaj leĝoj. Por reveni al la sociala asekuro: Ankaŭ en Eŭropo civitanoj apud la ŝtata sanasekuro povas havi privatan asekuron, ambaŭ kompletigas sin reciproke. Jen do la individueco, ĉar ĉiu mem decidas, ĉu havi ankaŭ privatan sanasekuron aŭ ne. Sed ĝenerale validas: sen (financa) solidareco de la komunumo la socio ne povas funkcii.

Se usonanoj ne subtenos la projekton de Obama, ili akceptas ke daŭre mortos du malriĉuloj dum ĉiu horo – estonte supozeble pli multaj. Eble ilimemoru, ke Otto von Bismarck, kiu inventis socialan asekuron, ne estis socialisto, sed konservativa politikisto. Ke lia plano, tiel batali kontraŭ socialismo, ne funkciis, tio ja montras: ŝtata sanasekuro estas nek socialisma nek alipartia afero, sed simple homa bezono en moderna socio. ■

Rezulto revolucia

Fine de aŭgusto okazis ĝenerala elekto al la japana ĉambro de reprezentantoj. Kiel antaŭvidite, triumfis la Demokrata Partio (DP) super la reganta Liberala Demokrata Partio (LDP).

La venkego okazis danke al nedemokratia balot-sistemo enkondukita de LDP jam en 1996. Tiel la partio esperis eterne regi. La problemo kuŝas ĉe la distriktoj, kie nur unu kandidato gajnas elekton, tiel ke voĉoj por la nesukcesintoj estas senutilaj. La distriktoj liveras 300 seĝojn, kontraste al kromaj 180 seĝoj, kiuj estas pribalotataj laŭ proporcia sistemo.

Do malgraŭ tio, ke en la distriktoj LDP ricevis 38,7 % de la voĉoj, ĝi rice-

vis nur 21,3 % de la seĝoj (64). Male, DP ricevis 47,4 % de la voĉoj kaj 73,3 % de la seĝoj (221). Rikoltis la aliajn seĝojn malgrandaj partioj.

Respondeco

La elekto-slogano de LDP tekstis: „LDP havas respondeco-forton.” Per tiu koncepto, kiu ne ekzistas en vortaroj, LDP volis montri, ke ĝi havas volon, devon kaj povon gvidi Japanion kun respondeco. Multaj homoj kredis, tamen, pro eventoj de la pasintaj jaroj, ke verdire mankas forto tia.

En septembro 2005 venkis LDP, sub ĉefministro Koizumi, interalie pro promeso privatigi la poŝtan sistemon. Baldaŭ evidentiĝis, ke la privatigo sekvas pli altajn tarifojn kaj forigon de poŝtoŝtupoj, ekzemple el vilaĝoj. Krome la registaro pli kaj pli moligis la regulojn, kiuj protektis laboristojn, donante grandan profiton al la kapitalistaro. Aperis senlaboruloj, neregulaj laboristoj kaj tre malriĉaj familioj. Maljunuloj estis diskriminaciataj. Eĉ bebnasko fariĝis malfacila pro manko de kuracistoj.

Post Koizumi sekvis diversaj ĉefministroj, dum la registaro montriĝis pli kaj pli nekapabla. La lasta ĉefministro,

Asoo, malsaĝe reagis al la ekonomia krizo, tiel ke fine pro malamo kontraŭ LDP, ne amo por DP, japanoj elektis la lastan.

Frateco

Nun DP fortas kaj en la ĉambro de reprezentantoj kaj en la ĉambro de konsilantoj. Ĝi nun povos fari, kion ĝi volas. La onta ĉefministro, Hatojama Jukio, promesis: „Mi celas socion plena de frateco, en kiu ĉiuj vivoj estas zorge gardataj kaj la feliĉo de alia estos ankaŭ la nia. Mi ĉesigos la ĝis nun faritan misuzon de la buĝeto kaj uzos tiel naskitan monon por la bono de popolanaj vivoj. Tio estas la ŝanĝo de la registaro.”


DP-registaro estas historia evento. Post la dua mondmilito, dum pli ol 60 jaroj, preskaŭ ĉiam LDP regis Japanion. Ĝi dependis de la kapitalistaro kaj Usono, disdonante parteton de la profitoj kiel ŝmirmonon al subtenantoj kaj aliaj. Fakte multaj estraranoj de DP devenas de LDP, sed la partio batalis kontraŭ LDP kaj do ne facile cedos al malnovaj metodoj.

Se DP plenumos siajn promesojn, ĝi ŝanĝos la socion kaj la nacion. Tial oni povos nomi ĝian grandan venkon revolucion.

HORI Jasuo



La kovrilo de la programo de la Demokrata Partio montras la estontan ĉefministron Hatojama Jukio kun slogano „Ŝanĝo de la registaro”.



Ponto por dialogo

Balotis 41 % de la voĉdonrajta loĝantaro de la kataluna urbeto Arenys de Munt [arenŝ' de mun] responde al la demando: „Ĉu vi konsentas, ke Katalunio fariĝu plenrajta ŝtato sendependa, demokratia kaj socia ene de Eŭropa Unio?” El tiuj, kiuj voĉdonis, respondis 96,18 % favore al sendependeco de Katalunio disde Hispanio.

Entute estis kunvokitaj la 13an de septembro 6515 civitanoj por voĉdoni. Partoprenis la baloton pli da homoj ol en la referendumo pri la eŭropa konstitucio (40,43 %) kaj en la lastaj eŭropaj elektoj (35,14 %).

Al la balotejo iris pli da urbanoj, ol esperis la organizantoj. Antaŭ la baloto oni ricevis leterojn de la ekstremdekstra frankisma partio *Falange* [falanĥe] kaj de la socialisma partio nuntempe reganta en Hispanio. Ambaŭ leteroj invitis la loĝantaron ne partopreni.



El tiuj, kiuj voĉdonis, respondis 96,18 % favore al sendependeco de Katalunio.

Kaseroloj

Kontraŭ la baloto protestis en la centra placo de Arenys de Munt 60 anoj de la frankisma partio. La falangistoj montris hispanajn flagojn kaj frankismajn simbolojn. Ili faŝisme salutis, asertante, ke Katalunio estas hispana. Policianoj izolis la faŝismajn protestantojn disde katalunaj sendependistoj. De apudaj balkonoj, najbaroj batis kaserolojn por brue protesti kontraŭ la ĉeesto de faŝistoj.

Oni balotis en la sidejo de kultura asocio apud la urbodomo pro malperme-

so de ŝtata tribunalo kunvoki la referendumon. Tial la magistrato de la urbeto transdonis la iniciaton al la asocio. Laŭ Carles Móra [karles mora], urbestro de Arenys de Munt, la celo estis obei la juĝan decidon, kiu malpermesis ĉian kunlaboron de la magistrato. La urbodoma salono, kiu devus gastigi la urnojn, akceptis sangodonacadon.

Amaskomunikiloj

Malgraŭ tio, ke la baloto malhavas leĝan valoron, la fakto, ke urbeto tamen organizis baloton kontraŭ la volo de la ŝtato, kaj kun faŝisma protesto, estis vaste priraportata en internaciaj amaskomunikiloj. La urbestro difinis la tagon kiel feston de demokratio, dirante: „Ni kontraŭas nenium, sed klopodas starigi pontojn por dialogo.”

Laŭ la magistrato, Arenys de Munt estas la unua kataluna municipo, kiu libere kaj demokratie voĉdonis por sendependa Katalunio. Nun pli ol 60 aliaj municipoj planas same referendumojn. Ili kunlaboras kaj kreis retejon: www.referendumindependencia.cat.

La ĵurnalo *La Vanguardia* raportis, ke lastatempe duobliĝis la apogantoj de sendependiĝo de Katalunio. Same, laŭ la ĵurnalo, kreskas sendependismo ekzemple en Kebekio.

Ferriol MACIP | BONET

La urbestro difinis la tagon kiel feston de demokratio, dirante: „Ni kontraŭas nenium, sed klopodas starigi pontojn por dialogo.”



ALBANIO

Ĉu septembro – aŭ aprilo?



Manifestacio en Hago, Nederlando, memore al genocido en Ĉamerio

Ĉi-jare en Pollando oni rememorigis la 70-jariĝon de la komenco de la dua mondomilito. Pollando estis invadita la 1an de septembro 1939, tamen argumenteble komenciĝis la milito pli frue, la 7an de aprilo, kiam italoj atakis kaj ekokupis Albanion. Prikomentis tiam la eventon brita ministro, Lordo Cecil: „La perfida atako de Mussolini al Albanio estas sendube la plej malfacila perfortaĵo kontraŭ najbara ŝtato dum la malfacila nuntempa situacio.”

Pri la eventoj de antaŭ 70 jaroj diris la germana kanceliero Angela Merkel: „La germana popolo sentas eternan respondecon pri tiu milito.” Tamen ankoraŭ ne tiel agnoske esprimis sin Beogrado pri la genocido en Kosovo aŭ eĉ Ateno pri tiu en Ĉamerio (greka regiono sude de Albanio, el kiuj estas elpelitaj en 1944 tieaj albanoj).

Bardhyl SELIMI

OPINIO

Planoj kaj prognozoj



Frank-Walter Steinmeier.

Frank-Walter Steinmeier, la kandidato de la germana partio SPD por la kanceliera posteno postaŭtune, lanĉis novan kampanjon

por redukti la kvanton de senlaboruloj. Li antaŭdiris, ke, se oni sekvas liajn rekomendojn, senlaboreco en Germanio reduktiĝos dum la venontaj dek jaroj ĝis nulo.

Do, li vidigas al kvar milionoj da senlaboruloj laborpostenon. Vidigas, sed ruze ne promesas: „Estas eble, ke ni atingos la celon.” Sed aktuale li bezonas kampanjon por levi sin kaj sian partion el la abismo de la balotaj prognozoj. Tial meze de somerferia vakuo li lanĉis paŝon post paŝo sian planon: unue per onidiroj, poste antaŭ publicistoj, fine antaŭ la publiko.

Konkurantoj

Tamen dubas ne nur la publiko. La politikaj konkurantoj akre riproĉas la kandidaton: CDU kaj FDP pro malsincereco kaj senkompeten-

to; maldekstruloj, ĉar ili promesis redukti senlaborecon nur je du milionoj; kaj verduloj asertas, ke Steinmeier piratis ilian sloganon, progresi per medioprotektaj projektoj.

Kion povas prognozi la legantoj de MONATO? Nu, se difinitaj partioj antaŭvidas redukti senlaborecon je kelkaj elcentoj, aliaj je duono, Steinmeier nun ja komplete plene tute, nur restas superi ilin per pli glora vizia prognozo. Ĉu ni do perspektivu, ke en dek jaroj ĉiu germano havos ne nur unu laborlokon, sed eĉ du, eble pli da? Ke ili tiam bezonos tiom da por vivteni sin kontentige?

Sed ni ne volas esti elektotaj. Tial ni ne tiom laŭte kaj ofte kaj publike prognozas, ĉar ni konas la proverbon: „Pacienca estas la papero, nur post jardeko montras sin la vero.”

Franz-Georg RÖSSLER
Germanio

Hejmen – en ĉerko

Post atako en februaro, kiam pereis 11 soldatoj burundaj, mortis en septembro en Somalio pliaj 21 pactrupanoj de la Afrika Unio (AMISOM). La islama ribelantaro Shebab konsideras la soldatojn invadintoj. Dum la atako estis vunditaj 40 trupanoj el Somalio, Ugando kaj Burundo, inkluzive de la AMISOM-ĉefo, generalo Nathan Mugisha.

La burunda registaro anoncis kvin-tagan nacian funebron sed deklaris sian pretecon daŭre subteni la pacprocezon en Somalio. Registara proprorolisto, Philippe Nzobonariba, diris, ke Burundo estis tiel subtenata dum interfrata milito kaj do ĝi reciproke helpu aliajn landojn en simila situacio. Se Burundo ne estus ricevinta helpon tian, atentigis Nzobonariba, Burundo estus en pli terura stato ol nun Somalio.

La ĉerkoj enhavantaj la kadavrojn de la 12 burundaj mortigitoj estas akceptitaj de du ministroj kaj poste metitaj en halon, kie familianoj adiaŭis la viktimojn.

Plifortigi pacon

La burunda popolo ne komprenas, kial militas samlandanoj en Somalio. Multaj timas, ke la ribelantaj Shebabanoj ekatakos en Burundo mem. „Gravas helpi aliajn retrovi kaj plifortigi pacon,” venas tipa reago, „sed necesas rapidege rehejmenigi niajn fratojn.”

Opozicianoj en Burundo opinias, ke soldatoj estas tien senditaj kontraŭleĝe kaj sen la aprobo de la nacia asembleo. Ĉiuj partioj postulas, ke la registaro klare diru al la popolo, kial burundanoj deĵoras en Somalio.

Siaflanke atentigas Shebab, ke se la burunda registaro sendos trupojn al Somalio, tiuj revenos en ĉerkoj. Tio jam okazis.

Jérémie SABIYUMVA/pg



Atako al la bazo de AMISOM sude de Somalio, starigis batalon inter Shabab kaj AMISOM en kiu, krom pluraj militistoj, pereis preterpasantoj.



La AMISOM-ĉefo, generalo Nathan Mugisha, montras la difektaĵojn pro atakoj al reprezentanto de AU por Somalio, S-ro Nicolas Bwakira.

Vojo al demokratio



Tri ĉefministroj, tiuj de Estonio, Litovio kaj Latvio, interkonsentas pri tago de rememoro pri la viktimoj de totalismaj reĝimoj.

Antaŭ 20 jaroj la detruita berlina muro signalis la finon de la malvarma milito en Eŭropo. Tamen, du monatojn antaŭe, en aŭgusto 1989, ĉirkaŭ du milionoj da litovoj, latvoj kaj estonoj staris homĉene inter Vilniuso, Rigo kaj Talino je distanco de ĉirkaŭ 600 km.

Tiel ili atentigis pri la 50a datreveno de la Molotov-Ribbentrop-pakto, laŭ kiu Sovetio kaj Germanio sekrete konsentis dividi mezan Eŭropon. Samtempe la homoj volis montri, ke sen la tri baltaj popoloj la kontinento ne povos esti unueca kaj libera. Laŭlonge de tiu ĉi „balta vojo” flirtis nigraj funebraj rubandoj kaj brulis kandeloj de homoj, kiuj esprimis sian deziron sendepende vivi. En 1991 la revo realiĝis.

Ankaŭ la aŭgusto de 2009 ne trankvilis en Baltio. En ĉiuj tri landoj okazis jubilea celebrado de la „balta vojo”, kiun akompanis koncertoj, diversaj manifestacioj kaj aliaj aranĝoj.

Koro

Ĉirkaŭ 60 000 homoj partoprenis maratonon inter Vilniuso kaj Talino, transdonante unu al alia simbolajn krucetojn. Aliaj kuris po unu kilometron kadre de la kampanjo *Mia koro batas por Baltio*. Aviadistoj disjetis florojn, kaj engaĝiĝis ankaŭ glisparaŝutantoj, biciklantoj, motorciklantoj kaj velŝipantoj.

La ĉefaj jubileaj aranĝoj okazis la 23an de aŭgusto. Tiam tra Litovio estis portata torĉo de la Balta Asembleo, okazis meso en la katedralo de Vilniuso, kaj estis inaŭguritaj fotoekspozicioj. Samtempe en Vilniuso, Rigo kaj Talino, en la lingvoj litova, latva kaj estona, estis kantata kanto *Baltio jam vekigās* popu-





Antaŭ 20 jaroj homa ĉeno tra tri baltaj landoj skuis Sovetion kaj kondukis al sendependeco.

lara antaŭ du jardekoj. Ĉe la limpunkto latva-estona estis starigita monumento: sep metalaj manpreme starantaj siluetoj.

Memoro

Samtage la ĉefministroj de la tri baltaj landoj (la litova Andrius Kubilius, la latva Valdis Dombrovskis kaj la estona Andrus Ansip) subskribis deklaron, ke en Eŭropo estu konscie kaj senkaŝe pritaksata komuna memoro pri la totalismaj reĝimoj de la 20a jarcento – stalinismo kaj naziismo. Ili interkonsentis, ke la 23a de aŭgusto fariĝu tago de rememoro de stalinismaj kaj naziismaj viktimoj.

Honoron al la partoprenintoj de la „balta vojo” esprimis la estro de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso. La direktoro de Unesko Koichiro Matsuura rimarkis, ke la homa ĉeno devigis Sovetion deklari la Molotov-Ribbentrop-pakton ne plu valida, tiel atestante pri la influo de etaj ŝtatoj al mondaj aferoj. La usona ŝtatssekretario Hillary Clinton diris, ke pro la „balta vojo” la tri landoj fariĝis ĉampionoj pri demokratio kaj homaj rajtoj.

LAST



JAPANIO

Rifuĝintoj pro domperdo



Pli kaj pli videblas rifuĝintoj pro domperdo en parkoj de la grandaj urboj.

Hieraŭ mi promenis en mia najbaraĵo. Tie, kie estis antaŭe rizkampoj, staras nova loĝkvartalo kun multaj domoj. En unu el la domoj mi trovis en la fenestro anoncon pri ties vendo. Tiu ĉi domo estis konstruita antaŭ eble du jaroj kaj estis loĝata de juna familio. Tiu, tamen, devis forlasi sian hejmon, su-

pozeble ne plu povante repagi al la banko pruntitan monon.

En tia okazo unue la banko provas vendi ĝin. Kiam ĝi ne vendiĝas, la banko almetas la domon al aŭkcio tra tribunalo. La nombro de domoj ĉe aŭkcioj ege multiĝis ekde la lasta somero. En marto 2008 la nombro estis 3773, sed en julio 2009, 7229. Pro la malbona

ekonomio multaj ne plu povas repagi la monon pruntitan por aĉeti domon.

Fabriko

La ĵurnalo *Mainichi* raportis en aŭgusto pri diversaj tiaj okazoj. Ekzemple Ŝimada Kooji (42-jara, falsa nomo por kaŝi la identecon de la familio), kiu laboris en fabriko pri elektraĵoj, aĉetis domon antaŭ 16 jaroj kontraŭ 48 milionoj da enoj (400 000 eŭroj).

Li planis repagi monate 160 000 enojn kaj somere kaj vintre, pro specialaj kromsalajroj, 450 000 enojn. Ĝis nun li ĉiam repagis, sed en la lasta aŭtuno la situacio ĉe la fabriko malboniĝis, kaj lia salajro estas tranĉita je 30 %. Cetero li multe ŝuldis pro la edukado de siaj gefiloj. Nun li timas, ke, se li ne ricevos la vintran krompagon, li devos forlasi sian hejmon.

Apartamento

Laŭ la Asocio de Nemovebla Propraĵo, multiĝas rifuĝintoj pro domperdo. Eĉ se homoj volas vendi sian domon, tio malfacilas en la nuna ekonomia situacio. Tial, ekzemple, Kizuki Tooru (50-jara, denove falsa nomo) perdis sian apartamenton, aĉetitan 18 jarojn antaŭe. Tamen restas ŝuldo, kaj li deklaris sin bankrota. Liaj familianoj forlasis lin, kaj li loĝas sola en malgranda apartamento, vane serĉante laboron.

Ĝis la 1990aj jaroj multaj homoj laboris en la sama kompanio ĝis emeritiĝo. Enspezigitaj monoj daŭre multiĝis laŭ tiel nomata sistemo de laŭlaborjara salajro. Multaj, tamen, ne antaŭvidis la ŝanĝojn en la socio kaj en la ekonomio. Savi homojn tiam estas la tasko de la politiko. Helpe tamen ne venas, aŭ tre malrapide, kaj pli kaj pli videblas rifuĝintoj pro domperdo en parkoj de la grandaj urboj.

Hori Jasuo
Japanio



Multaj domoj nun vendoprete vakas pro la nuna stato de la ekonomio.

Nokaŭto!

Inter 1964 kaj 1990 malpermesis la albana ŝtato religiajn ritojn kaj eldonaĵojn kaj fermis ĉiujn religiajn instituciojn. Pli malpli samepoke ĝi malpermesis – tamen ne laŭleĝe – boksadon. Ambaŭ malpermesoj rezultis el la amikeco inter Albanio kaj komunisma Ĉinio de Maŭ Zedong.

Laŭ la albana boksisto kaj verkisto Ahmet Golemi, Maŭ ĉeestis en 1963 sportan eventon en Pekino kaj, spektante boksadon, ŝokiĝis pro „kruela sporto, kiu povus malpliigi la loĝantaron de Ĉinio”. Tuj poste „burĝa” boksado estis malpermesita.



DANI BEGOOD

Same kelkajn monatojn poste en Albanio. Tiam prosperis boksado kaj Albanio estis pretiganta teamon por partopreni ludojn en Indonezio. Ahmet Golemi, kiu en sekvaj jaroj daŭre verkis por la gazetararo pri boksaj aferoj, estis enkarcerigita.

Dum la malpermeso albanoj ĉiam ŝatis ĉi tiun sporton kaj kaŝe spektis matĉojn danke al fremdlandaj televidaj elsendoj (kaj same faris dum ekzemple internaciaj kanzon-festivaloj).

Bardhyl SELIMI

Floras la prezidantino

Botanikistoj kreis novan florspecon honore al la lastatempe elektita prezidantino de Litovio, Dalia Grybauskaitė. La novan hibridon, el la floro *lophospermum*, la botanikistoj de la litova agrikultura universitato intencas nomi *Lophospermum x lituanicum Dalia Grybauskaitė*.

La universitata fakestro klarigis, ke la nova hibrido estis kreita el du malsamaj specioj kultivataj dum kelkaj jaroj. La nova specio ekfloris, dum Litovio omaĝis la jarmilon de sia nomo kaj kiam unuafoje en ĝia historio kiel prezidanto estas elektita virino. Tial la botanikistoj decidis doni al ĝi litovan nomon.

La nova floro estas rara planto reproduktata nur en provtuboj. Kiam ĝi estos reproduktita, ĝi estos dissendita al botanikaj ĝardenoj de la mondo.



LAST

La rara prezidantina planto „*lophospermum*”.

SONĜOJ

Ŝlosila teorio



Antaŭ jaroj, kiam mi estis universitata studento, unu el miaj samklasanoj rekomendis al mi libron en la angla lingvo kun la titolo *An Experiment with Time* (*Eksperimento pri la tempo*). En la verko, kies tezon mi hodiaŭ nur nebule rememoras, la aŭtoro, iu J. W. Dunne, asertas, ke ne estas klara divido inter la estinteco, la estanteco kaj la estonteco. Pro tio, laŭ Dunne, la konscio kapablu transiri inter ekzemple as-tempo kaj os-tempo.

Dunne proponas, ke tiu ĉi transiro povas okazi dum dormo pere de sonĝoj. Li do invitas la leganton teni preta sur apudlita tableto notlibron, en kiun oni metu detalan priskribon pri siaj sonĝoj aŭ sonĝoj. Tio estu farita, antaŭ ol la memoro pri la sonĝo tute malaperas (kio preskaŭ ĉiam okazas tre rapide post vekiĝo). Tiel, laŭ Dunne, eblus montri, ĉu la konscio aŭ eĉ subkonscio kapablas antaŭvidi

eventon aŭ eventojn ankoraŭ ne okazintajn en la nuntempo.

Rezultoj

Mi akceptis la inviton de Dunne kaj provis tiel registri miajn sonĝojn. Malkiel kolego, kiu asertis, ke li havis kelkajn promesplenajn rezultojn, kiam li faris la eksperimenton, miaj rezultoj estis malkontentigaj. Ĝenerale miaj sonĝoj neniel rilatis al aferoj okazintaj dum la tago. Ili konsistis simple el konfuzaj bildoj, supozeble influitaj de eventoj spertitaj aŭ viditaj, antaŭ ol mi enlitiĝis.

Tamen lastatempe io okazis, kio memorigis min pri la tezo de Dunne. Iun nokton mi tre klare sonĝis pri perdita ŝlosilo. La fono jenas: antaŭ jaroj mi kaŝis ŝlosilon de la malantaŭa dompordo sub la tegmenton de ĝardenabudo. Tiel, se unu el niaj filoj senaver-

te venus dum nia foresto, li povus preni la ŝlosilon kaj eniri la domon.

Klopodoj

Bedaŭrinde, flanke de la loko, kie mi kutime lasis la ŝlosilon, estis mallarĝa fluejo, en kiun mi iutage perdis la ŝlosilon. Ĝi malaperis kaj, malgraŭ pluraj klopodoj, mi ne sukcesis eltiri ĝin. Do mi devis anstataŭigi ĝin per alia ŝlosilo.

Mi revenu al mia sonĝo. En ĝi mi troviĝis sur eskalo, refoje provante trovi kaj elpreni la ŝlosilon el la subtegmenta fluejo. Laborante de sub trabo, mi finfine sukcesis en la sonĝo eltiri la ŝlosilon. En la mateno post la sonĝo, mi trovis min en stranga mensostato. Mi ne certis, ĉu la retrovo de la ŝlosilo fakte okazis, aŭ ĉu mi nur sonĝis. Mi demandis al mia edzino, kiu ne serioze traktis la aferon.

Generalo

Mi elprenis eskalon kaj malnovan tranĉilon, suprengrimpis kaj, uzante la procedon, kiun mi imagis dum la sonĝo, sed laborante inverse (do desupre, anstataŭ desube), mi trovis kaj eltiris la malnovan ŝlosilon. Pro longa tempo post la perdo ĝi estis nigre makulita, sed ankoraŭ uzebla. Mi purigis ĝin kaj triumfe envenis la domon kiel venkinta generalo.

Poste mi demandis min, ĉu mi finfine pruvis la tempo-hipotezon de Dunne. Amiko mia diris, ke ofte dum dormo la subkonscia menso klarigas problemojn, kiujn ni dumtage ne povas solvi. Tion mi mem jam plurfoje spertis.

Mi konkludis, tamen, ke la eksperimento de Dunne pri la tempo restas nepruvita. Tamen la temo ankoraŭ fascinas min. Eble leganto de MONATO havas spertojn, kiuj kontribuas al diskuto pri la esenco kaj funkcio de la tempo.

Garvan MAKAI
Irlando



Artikolojn pri la vivo en via regiono
sendu al moderna_vivo@monato.net.

FRANCIO

Fortikaĵurbo Gerando

FRANÇOIS SCHNELL



ANDREW KISLIAKOV

Gerando estas ĉarma urbo en nord-okcidenta Francio, kiu kuŝas sur samnoma duoninsulo ĉe la Atlantika Oceano kaj estas parto de suda Bretonio. Ĝi estas iama ĉefurbo, konata pro siaj riĉa historio kaj unika aspekto. En Gerando superregas du diferencaj pejzaĝoj: „blanka” (pro la produktado de salo el oceana akvo) kaj „nigra” (pro la najbareco de vastega marĉo de Granda Briero).

En ĝia regiono pluraj lokoj atestas pri homa loĝado ekde pratempoj. Mezo-litikaj kaj neolitikaj restaĵoj videblas en kelkaj vilaĝoj. Aktualaj esploroj pruvis spurojn de daŭra restado ekde la neolitiko ĝis la fer-epoko, dum kiu periodo la loĝantoj jam praktikis agrikulturon kaj produktis salon. Poste la regionon konkeris romianoj. Du domaroj sur la kamparo atestas pri la tiutempaj vivkondiĉoj, nome Clis [kli] kaj Beaulieu [boljé]. En ĉi-lastaj supozeble estis dia kultejoj. ▶



FRANÇOIS SCHNELL



FRANÇOIS SCHNELL

► Gerando estis koloniigita de bretonoj en la dua duono de la 6a jarcento. Ĝia origina bretona nomo estis *Uuenran*. Surbaze de la arkeologiaj trovaĵoj apud la nuna preĝejo fine de la 19a jarcento, iuj atribuas la fondon de la urbo al trupoj de la bretona princo Varoch (577-594), veninta el najbara urbo Vannes [van]. Aliaj subtenas la hipotezon, ke Gerando disvolviĝis ĉirkaŭ la preĝejo de Sankta Aubin [obén].

Al la bretona reĝo Salomon (857-874) oni aljuĝas la fondon de gimnazio por kanonikoj. La geranda senjorio estis regata de la episkopo de Nantes [nant] kaj de la duko de Bretonio. Ĝi estiĝis ankaŭ grava celo por la regantoj dum la milito pri heredo de Bretonio inter 1342 kaj 1381. Poste la fama familio Monfort konstruigis imponajn remparojn ĉirkaŭ la urbocentro, trafe adaptitajn al la evoluo de artilerio. Tiuj defendmuregoj, kiuj estas bone konservitaj, estas nun videblaj.

En la mezepoko Gerando estiĝis grava religia, administra kaj komerca centro de la duoninsulo, kies riĉeco fontis el komercado per salo kaj vino. En ties ĉirkaŭaĵo aristokratoj konstruigis bretonstilajn nobeldomojn, kiuj posedis

ankaŭ agrojn, muelejon kaj kapelon.

La urbo iame estis haveno ĉe Atlantiko, sed ekde la 16a jarcento pro ensabliĝo ĝi perdis sian marfamon favore al Le Croisic [krüazík] kaj Le Pouliguen [puligén]. Tiu periodo postlasis belajn ĉarpentaĵojn en la preĝejo kaj sur pordegoj de nobeldomoj. Nur la nobeldomo en Careil [ka-réj] prezentas novstilan loĝejon.

En la moderna epoko

Kvankam ekonomie malfortiĝinta, Gerando plu restis religia kaj administra centro. Reĝaj oficistoj, monaĥoj, aristokratoj kaj komercistoj konstruigis en la mezepoka urboparto klasikajn arkitekturaĵojn, kiuj donas la hodiaŭan aspekton de la urbo. Pilastro-pordoj, frontonoj ornamas la plej belajn domojn; dekoraĵoj emfazas la regulecon de fasadoj kaj skulptitaj lukoj plibeligas la ardezaĵn tegmentojn.

Bonŝance fine de la 18a jarcento la bretona guberniestro decidis, ke oni konservu la remparojn, kvankam ili ne plu utilis, kaj ornamu la ĉirkaŭajn promenejojn per arboj.

Gerando okupis la duan lokon laŭ la nombro de loĝantoj (post Nantes) en la nova distrikto Loire-Inférieure (Mallalta Luaro). Tamen de la 19a jarcen-

to komenciĝis periodo de demografia malkresko. La urbo ne profitis la industrian aŭ turisman disvolviĝojn, okazintajn en la najbaraj urboj Saint-Nazaire kaj La Baule. Tamen iompostiome novaj loĝejoj ĉirkaŭis la bulvarojn, kaŝante la vidaĵon al salmarĉoj. En la urbo oni konstruis stacidomon en 1879, kaj novajn foirhalojn en 1912.

La konsciiĝo pri la graveco de urba heredaĵo, priantita de fama verkisto Balzac [balzák], ebligis registron de la preĝejo (1856) kaj fortikaĵo (1877) en la Listo de Historiaj Monumentoj. Baldaŭ poste komenciĝis la unuaj renovigoj. Ekde 1960 la demografia kaj ekonomia evoluo aldonis novan aspekton al la moderna civito, kie najbaras loĝejoj, komercaj, industriaj, sed ankaŭ kulturaj kaj sportaj konstruaĵoj. Arkitektoj zorgis pri la konservo de urba aspekto per respektado de la historiaj heredaĵoj kaj panoramoj.

Vidindaĵoj

La fortikaĵo de Gerando datumas grandparte de la 15a jarcento. La remparojn oni konstruis sur la loko de restaĵoj. Ses turoj kaj kvar pordegoj markas punktojn laŭ la 1434 m longaj kaj bonege konservitaj kurtinoj. Ĝi pre-



FRANÇOIS SCHNELL



FRANÇOIS SCHNELL

mitaj pilieroj de la konstruaĵo. La nunan preĝejon oni konstruis en la 15a kaj 16a jarcentoj en flamgotika stilo.

La Kapelo de la Blanka Sinjorino estas sidejo de urba paroĥejo. Ĝi estas la plej malnova konstruaĵo, situanta interne de la fortikaĵo kaj estis konstruita en la 13a jarcento. La sobreco de ĝia gotika stilo plibeligas la unusolan navon. En la kapelo oni subskribis la duan traktaton pri Gerando en la jaro 1381, kiu metis finon al la konflikto inter la reĝo de Francio kaj la duko de Bretonio.

Jean-Yves SANTERRE

zentas gravan ateston pri la rapideco en la adaptiĝo de militaj arkitekturaĵoj al la apero kaj evoluo de artilerio.

Unu el la kvar pordegoj estas la Pordego de Sankta Mikaelo, kiu staras, ĉirkaŭita de du turoj, ĉe la ĉefa enirvojo kaj montras identecon kaj povon de la urbo. Konstruita meze de la 15a jarcento, en ĝiaj turoj loĝis sinsekve guberniestroj. En la 19a jarcento ĝi estiĝis urbodomo. Nun en ĝi funkcias muzeo pri la geranda regiono.

La romanstilan preĝejon de Sankta Aubin oni detruis dum rabado de Gerando en 1342. Postrestis nur la orna-



FRANÇOIS SCHNELL

Obstrukco de la surstrata cirkulado



KLEARCHOS KAPOUTSIS

La problemo pri la obstrukco de la surstrata cirkulado ekzistas plimalpli en ĉiuj grandaj urboj en la mondo. Dum la lastaj dudek jaroj post la radikaj ŝanĝiĝoj en Bulgario la 10an de novembro 1989 tiu ĉi problemo fariĝis aparte grava por la ĉefurbo Sofio, kies loĝantaro rapide kreskis, atinginte pli ol 1 200 000 homoj. Same rapide kreskis la nombro de la aŭtomobiloj, granda parto de kiuj estas importitaj uzitaj el la okcident-eŭropaj landoj. Ĉiam ankoraŭ ne estas solvita la demando de la trafiko ĉe iuj ŝlosilaj vojkruciĝoj.

Tio igis Nikolaj Georgiev kalkuli la jarajn malgajnojn por la lando pro la ŝtopiĝo de la surstrata cirkulado nur en Sofio. Li publikigis tiujn kalkulojn en artikolo titolita *Sofio malgajnas 1,5 miliardojn da levoj¹ jare pro la obstrukcoj de la surstrata cirkulado*, aperigita en la ĉiutaga ĵurnalo *19'* de la 11a de decembro 2008. La sumo 1,5 miliardoj da levoj

egalvaloras al 3 % de la malneta enlanda produkto (MEP) de la lando. Tiu ĉi ekonomia malgajno estas la reala malgajno. Estas ankaŭ virtuala malgajno – preterlasitaj gajnoj kaj enspezoj. La laborantoj veturas averaĝe pli 45 minutojn tage, kaj en la urbo laŭ la informo de *BGBusiness* laboras ĉirkaŭ 680 000 homoj. Se ili ne perdus tiun ĉi tempon por veturado, ili povus labori kaj produkti personajn kaj publikajn enspezojn. Praktike tage por la ekonomio de Sofio estas malŝparataj 510 000 laborhoroj aŭ 117,3 milionoj da laborhoroj jare. Tiele anstataŭ estado en la veturiloj ili realigus aldone 3 % MEP por la lando. En la ĉefurbo estas produktata 33 % de la MEP de la lando aŭ ĉirkaŭ 18,6 miliardoj da levoj por la jaro 2007. Ĉe 40-hora laborsemajno ĉiu sofiano en 2007 produktis MEP dum unu laborhoru je 14,9 levoj. Se la okupiĝoj en Sofio laborus aldone 45 minutojn anstataŭ perdi sian tempon en la trafiko,

ĉiun labortagon ili estus kreintaj aldone produkton por 7,59 milionoj da levoj aŭ 1,747 miliardoj da levoj jarbaze. Se tiu ĉi aldona produkto realiĝus, ankaŭ akumuliĝus novaj enspezoj el impostoj sume 700 milionoj da levoj. Krome pro la kilometrojn longaj kolonoj de veturiloj krom la laborantoj suferas ankaŭ ĉiuj ceteraj veturantoj, kiuj perdas tempon, necesan por ripozo kaj por plibonigado de la kvalifiko.

Aparte suferas la lernantoj, kiuj perdas tempon por veturado anstataŭ plibonigi sian kvalifikon. Krom ekonomiajn perdojn la obstrukcoj havas ankaŭ gravan negativan ekologian efikon – malpurigon de la aero, kio pligrandigas la riskon de pluraj malsanoj. La malfacila veturado rezultigas ĉiutagajn streĉojn kaj efikas terure damaĝe sur la nervojn de la veturantoj.

Iu tamen gajnas el la trafikŝtopiĝoj. Tiuj estas la benzinkompanioj. Ĉiutage pro la obstrukcoj disipiĝas ĉirkaŭ 600 000 litroj da brulaĵo laŭ la donitaĵoj de la registaro. Tiuj ĉi 600 kubaj metroj konsumitaj en la ĉefurba trafiko donas por ili suman profiton de 24 000 levoj.

En la supre citita numero de la gazeto *19'* estas informo, ke pro la multnombraj obstrukcoj de la surstrata cirkulado, kiuj ampleksas tutan Eŭropon, Eŭropa Unio havas jare perdon de ĉirkaŭ 140 miliardoj da eŭroj. La ekonomio de Usono perdas tial jare proksimume 200 miliardojn da dolaroj. La problemoj, ligitaj kun la vicostarado sur la stratoj, instigis iujn ŝtatojn entrepreni maltradiciajn agojn por limigo de la nombro de la aŭtomobiloj, koncentrante siajn penojn al atingo de ideala stato de la publika transporto. Ankaŭ en Bulgario estas lanĉitaj ideoj tiudirekte.

Dimitar HAĜIEV

1. 1 levo egalvaloras 0,5 eŭrojn.

Kardopapilio donas esperon

Ju malpli da papilioj en via ĝardeno, des malpli bona estas la medio en via ĉirkaŭaĵo. Tiu fakto en la pasintaj jaroj zorgigis la loĝantojn de la malaltaj landoj apud la Norda Maro, ĉar papilioj preskaŭ ne plu estis videblaj. Tamen la situacio pliboniĝis, ĉar ĉi-somere la ĝardenposedantoj povis nombri plurajn dekojn samtempe.

Por certigi, ke la reveno de la papilio estas ne nur impresio, tri asocioj de papili-amantoj, la nederlanda, la flandra kaj la valona, organizis papilinombrodojn. Ĉi-jare en la 2a de aŭgusto miloj da emuloj nombris multe pli da ekzempleroj ol en la pasinta jaro. Wouter Vanreusel [voŭtr vanrejsl] de la asocio *Natuurpunt* vzw klarigas, ke estas iom tro frue por jam jubili, sed ke tute klare almenaŭ provizore la papilio revenis kaj donas esperon pri nia medio. Tagaj papilioj ja tre rapide reagis al media malpurigo aŭ al klimatsanĝiĝoj. „Kompare kun la pasinta jaro ni nombris multe pli”, diras



La kardopapilio estas la plej ofta papilio en la regiono apud la Norda Maro.

Vanreusel. „Plej okulfrapa estas la reveno de la kardopapilio (*Vanessa cardui*), kiu nun estas, kaj en Flandrio kaj en

Valonio kaj en Nederlando, la plej ofta papilio.”

Paŭl PEERAERTS




Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

La Origino de Specioj Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Esperantigante rifuĝintojn el Afganio



Tereza Kapista, serba esperantistino, akceptis peton gvidi Esperanto-kurson en Irano al rifuĝintoj el Afganio kaj rakontas siajn spertojn sur pli ol kvindek paĝoj. La libro impresas kiel taglibro aŭ serio de dumvojaĝaj leteroj.

La vojaĝo kaj lecionoj en diversaj urboj estas ĉeftemoj, kiujn la aŭtorino „spicas” per observoj pri la ĉiutaga vivo. Ekzemple, la skribmaniero – de dekstre

maldekstren, komencante per kio al la-tinliteruloj estas la lasta kajerpaĝo, la televidaj programoj, vizito en Maŝhad al la tombo de Imamo Reza, manĝoj en tre gastamaj hejmoj, ekskurso al monto Mandazam.

Estas klare, ke la vojaĝo forte helpis la disvastigon de Esperanto en Irano, ne nur inter afganoj, sed kelkurbe ankaŭ inter irananoj. La lecionoj okazis en agrabla etoso kaj ofte estis tre praktikaj, ekzemple, vizito al bazaro por montri legomojn kaj diri la esperantan nomon kaj diskutado de nuntempaj temoj kiel la homaj rajtoj. Kelkfoje la aŭtorino miras pri islamaj reguloj – ekzemple, ke unu viro valoras du virinojn (temas pri atestado en juĝa proceso) kaj la vestado de virinoj ekster siaj hejmoj (kiu fakte estas kultura heredaĵo, kiu diferencas laŭ la landoj.)

La libro finiĝas per receptoj de kelkaj manĝaĵoj. Havante iranajn geamikojn, mi povas atesti pri ilia tre agrabla gusto!

36 fotoj ilustras la agrablan etoson kaj interesajn spertojn; ilia sinsekvo iom miksiĝis: la paĝoj kun n-roj 25-29 venas post tiuj de n-roj 30-36.

Kvankam la libron lingve kontrolis spertaj esperantistoj alialandaj, restis kelkaj malgлатаĵoj, ekzemple, p. 24: „Masayuki kelkfoje vizitis Beogradon kies libron pri Yumeiho masaĝo mi serbigis.”

Anneke Buys

Tereza Kapista: *Esperanto, Lingvo de paco en Irano*. Eld. La aŭtorino, Beograd, 2006. 111 paĝoj broŝuritaj. ISBN 978-901073-9-1.

Prezo ĉe Flandra Esperanto-Ligo: 13,50 eŭroj + afranko.



**La libroj kaj
diskoj recenzitaj
en MONATO
estas mendeblaj
de la Retbutiko
de FEL**

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.



UNICEF IRAN

Plia heroo por Esperantujo

Jen kvin eroj el itala bildstrio, prezentitaj en Esperanto. La unua (el 1989-96) titoliĝas *La skuegaj originoj de Rat-man*, el kiu oni rapide komprenas, ke temas pri parodio de la usona komikso Bat-man. Tiu kutimas funkciigi serĉlumilon, en kies lumo aperas vesperta silueto; ĉe Rat-man tio fariĝas formo, simila al la kapo kaj oreloj de Miki-muso.

La dua rakonto nomiĝas *Rat-man kontraŭ la araneo*. Tiu sekvas la tradicion de la originalo, ke Bat-man kaj liaj

kontraŭuloj akiris siajn unikajn kapablojn pro eksterordinara evento – toksigo je mistera substanco aŭ mutaciigo pro nuklea akcidento aŭ simila, kun aludoj pri obstakloplena kaj maljusta juneco por klarigi la nunan kontraŭnorman konduton.

La minaco verda atakas en la tria rakonto – temas pri io pli organika ol esperantistaj brigadoj. Ĝi eskapas de la laboratorio de freneza sciencisto kaj Rat-man devas konfronti ĝin per sia kutima heroeco.



En la kvara rakonto rajdas en la vivon de Rat-man Ĉincja la Barbara, kiu emas esprimi sin per kantado de fragmentoj el popularaj anglalingvaj amkantoj. Cetere, konvene alloga virino sukcesis enplekti sin en ĉiujn el la aventuroj, sed Rat-man (kiel Bat-man) neniam sukcesas trovi tie daŭran kontentiĝon. Ĉi-okaze Ĉincja trudas sian volon al la malvolema Rat-man.

La lasta rakonto, eble la plej facile digestebla, temas pri Titanic 2000 – aludante la eventojn de la jaro 1912 kaj al la novjarmila apero de la samnoma eposfilmo. Ĉi-foje la ĉefa virina rolo estas plenumata per vivgranda blovpupo, kun speciala gasta rolo por la glacimonto.

Adiaŭan bison provizas rakonteto pri tio, kiel Rat-man klopodas, sed malsukcesas aliĝi al sia unua Esperanto-kurso – verkita de Daniele Binaghi kaj desegnita de Andrea Rosetto, kiu estas intervjuita sur la sekvaj paĝoj.

La originalo havas italajn vortserĉojn, foje bone redoneblajn en Esperanto, dufoje klarigitajn per piednoto, en unu-du aliaj lokoj oni sentas, ke la originalo eble estis iom pli forta. Rat-man rompas ĉiujn el la konduk-reguloj por herooj; li ne estas aparte kuraĝa, liaj savplanoj kutime malsukcesas kaj li ĝuas preterkutiman malbonŝancon – en parodia stilo simila al tiu de Maxwell [maksvel] Smart el la populara TV-serio el la 80aj jaroj – kaj



retrovebla en nia E-mondo per kontrastigo de la spionoj 007 kaj 005.

La tuto estas pretigita per stila fideleco al la Bat-mana fonto, granda imagopovo, desegno-lerto kaj konvene densa spriteco.

Stefan MacGill

Leo Ortolani: *Rat-man*. El la itala tradukis Christina de Giorgi, Daniele Binaghi (projektestro), Filippo Zanozer, Luisa Oberrauch Madella. Eld. Projekto RoMEo, Espero por IEJ kaj JEFO (itala kaj franca TEJO-sekcioj), 2007. 128 paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 9 eŭroj + aŭfranko.

La mistera nokto

Mi estis la pli granda, poste la plej granda infano de miaj gepatroj, do, vole-nevole, mi devis esti pli kuraĝa ol miaj gefratoj. Tio ĉi signifis ankaŭ tion, ke mi gvidis ilin al ĉiuj infanaj miskondutoj.

Nur unu ekzemplon mi menciui: dekjara mi estis, mia fratino naŭ, kiam ni ekprovis fumi, kaŝe, la unuan cigaredon, sed ankaŭ la trijara frato volis ekprovi. Memkompreneble, ege rapide evidentiĝis nia nova malbona ago, kaj kompreneble, mi ricevis la plej grandan punbaton de mia Dolĉa Patro, precipe pro mia frateto. Mia Dolĉa Patro estis pasia fumanto (pro tio li mortis jam tro frue, 65-jaraĝa), kaj de li ni ŝtelis la venenfortajn cigaredojn. Tiam mia Dolĉa Patro ne sciis, ke ni volas nur imiti la plenkreskulojn, unuavice lin. (Bedaŭrinde, miaj gefratoj, plenkreske, iĝis fumantoj, sed mi, male, iĝis forta malamiko de fumado.)

Do, mi estis ĉiam sufiĉe kuraĝa, kelkfoje eble eĉ aŭdaca, tamen mi havas kelkajn memoraĵojn pri okazaĵoj, kiam mi ege timis.

Nur okjara mi estis, kiam ni somerumis en iu bela ripozloko. Niaj dometoj estis sur monteto, meze de fabelece bela arbaro. Mi memoras pri la bonega, freŝa aero, kiun ni ĝuis en la arbaro promenante, precipe kun mia tre amata tria onklo. Ni ĉiam trovis kaj manĝis rubusojn kaj arbarajn fragojn, ege bongustajn.

Alvenis poste ankaŭ la plej juna onklo, la kvara fratino de mia Dolĉa Patro, kiu talente fortepianludis. Ĉe la piedo de nia monteto, en la granda domo, kie loĝis la proprietuloj de surmontetaj dometoj, preskaŭ ĉiuvespere okazis „hejma koncerto”. Ŝi ludis de Raĥmaninov ĝis Liszt, sed ankaŭ Chopin. La muziko estis aŭdebla ĉirkaŭe, ankaŭ ni aŭdis, sed ni ne aŭskultis ĝin, ja por ni la plej grava okupiĝo estis la ludo. Ni infanoj ludis inter la dometoj sur monteto preci-

pe kaŝiĝludon. Inter la arboj estis multaj bonegaj lokoj por sin kaŝi. Okazis iutage, ke dum la ludado, subite ekpluvis. La nuboj treege rapide alproksimiĝis. Tipa, somera tempesto torentis sur la monteton. Ĉiuj ludantaj infanoj kuris en la domon, krom ni du. Nur la serĉanto kaj mi malsekiĝis en la pluvo. Li nepre volis kapti min, sed mi neniel volis esti trovita. Suzi, la servistino, jam kriegis, ke ni finu la ludon kaj revenu en la domon. Mia kunludanto obeis, sed mi ankoraŭ restis, kaŝante min malantaŭ grandega arbo. Sed la pluvo jam iĝis pluvego, do, mi decidis malkaŝiĝi kaj mi ekkuris al la domo. Eble duonvoje mi estis inter mia kaŝloko kaj la domo, kiam fulmo frapis ĝuste arbegon mian. La tondro preskaŭ surdigis min, kaj la vento de la fulmo ĵetis min surteren. Suzi terurigante elkuris kaj enportis min inter siaj brakoj al la domo. Ke mi estis ĝisoste malseka, ne estis tiel grava problemo, kiel la fakto, ke min trafis plorkonvulsio. Post unu horo, kiam miaj gepatroj hejmenvenis, ili trovis min ankoraŭ plorantan. Sekvonttage mi vizitis mian karbiĝintan arbegon. Tiam mi ne pensis pri la mirfakto, nur plenkreske mi konsciiĝis, ke nur sekundoj mankis, ke ankaŭ mi tie neniĝu. Pro mia stulta „kuraĝo”, ĉar mi ne timis la pluvon.

Dum mia tuta vivo mi ne povis ekami fulmotondrojn. Vane estas fulmoŝirmilo sur la domtegmento, vane estas fermitaj ĉiuj pordoj kaj fenestroj, mi sidas streĉite atendante la finon de la tempesto. Tage. Sed nokte? Nu, eĉ nun, mi metas mian kapon sub la kusenon, ke mi nek vidu nek aŭdu tion, kio morttimon kaŭzis en mia infanaĝo.

Laŭ horoskopo mi estas kankro. Kiu tute ne okupiĝas pri ĉi tiu „malserioza scienco” – kiel multaj homoj nomas ĝin –, tiu ne scias, ke ni, kankroj, estas altirataj de la luno kaj la lunŝanĝojn ni forte sentas. La luno ne nur al la tajdo havas

influan. Precipe la plena luno havas grandan influon ankaŭ al ni. Nome, ĝi ne lasas nin dormi. Pasas horoj, kelkfoje preskaŭ la tuta nokto, sen dormo. Tion mi ne sciis, sed spertis jam en frua infaneco.

Certe estis plenluna nokto, pri kio mi rakontas al vi. Mi memoras, ke miaj gepatroj ankoraŭ ne estis hejme. La socio, al kiu ili apartenis, konsistis el kelkaj junaj, geedzaj paroj, kiuj ofte renkontiĝis ĉe unu el ili.

Eble kvar- aŭ kvin-jara mi estis tiutempe. Mia fratino feliĉe dormis, sed mi sendorme kuŝis en mia liteto kaj timis.

Du timigaj aferoj ne lasis min dormi. La unua estis iu mistera brueto. La pordo inter nia ĉambro kaj la banĉambro estis malfermita, ĉar la fenestrojn al la strato de nia ĉambro oni ne povis lasi malfermitaj, do, oni aerumis nokte tra la malfermita fenestreto de la banĉambro.

Stranga, timiga estis tiu konstanta brueto, fakte frapado, kiu preskaŭ senĉese aŭdiĝis. Kelkfoje ĝi iĝis pli forta, preskaŭ alproksimiĝanta, poste ĝi mallaŭtiĝis, apenaŭ aŭdiĝis. Etaj paŭzoj interrompis la brueton, esperon donante, ke ĝi finiĝas. Sed la paŭzon sekvis la denove ekaŭdebla brueto, eĉ pli timiga, ĝuste pro sia insista persisto. Tiam, mi ne povis diveni, kio ĝi estas, de kio fontas tiu brueto, mi nur timis. Nur post jaroj mi solvis la enigmon.

En la najbara vilao loĝis la ĉefo de mia Dolĉa Patro. La fenestro de nia banĉambro estis en tiu parto de nia loĝejo, kie troviĝis ilia belega, florplena ĝardeno, ĉirkaŭanta la vilaon. Ili estis ege riĉaj. La ĉefo de mia Dolĉa Patro estis la posedanto kaj direktoro de la plej granda fabriko de la urbeto, kie mi naskiĝis kaj loĝis antaŭ la dua mondmilito. La direktoro havis du filojn, kun kiuj malofte, tamen kelkfoje ni kunludis. Ili apartenis al alia socia klaso. La direktoro estis ĉiam tre amika kun ni, sed lia edzino estis fierega, mi ne memoras, ke ŝi diris al

ni infanoj eĉ unu afablan vorton. Ŝi estis la Sinjorino, kies hejmon priresponde-
cis la servistaro. Ankaŭ apud la knaboj
estis guvernistino, kiu estis maljuna, tre
malbela, tamen agrabla virino, la „Fräu-
lein”. Ŝi parolis kun la knaboj nur ger-
mane. Kelkfoje ni, fratino kaj mi, estis
invititaj al festa, posttagmeza manĝeto,
kiam okazis naskiĝtago de la knaboj. Mi
ekadmiris la loĝejon de veraj riĉuloj. Ĝi
estis plenplena de persaj tapiŝoj, en la
vitrinoj brilis la kristaloj, sur la muroj
pendis grandegaj kaj belegaj pentraĵoj,
kaj eĉ la meblaro diferencis de niaj sim-
plaj, malmodernaj mebloj.

Alvenis la milito ankaŭ en nia ur-
beto. Multaj loĝantoj rifuĝis antaŭ ĝi.
Tiam okazis, ke la unuan fojon vizitis
nin la edzino de la direktoro. La fierega
Sinjorino estis tute alia. Ŝiaj okuloj es-
tis larmoplenaj. Ŝi ĉirkaŭbrakumis mian
Dolĉan Patrino kaj kisis ŝin, samtempe
petante, ke nia familio atentu kaj gardu
la vilaon, se eblas. Ili devas rifuĝi, pro
certa cirkonstanco. Kiam mia Dolĉa
Patrino rakontis al mia Dolĉa Patro la
okazintaĵon, el ilia diskuto mi ekkom-
prenis tiun „certan cirkonstancon”.

Unue alvenis la germanaj soldatoj.
Mi estis vokita al la najbara vilao, por
paroli kun la oficiro, kiu enloĝiĝis en la
belegan domon. Nur unu sola servistino
restis en la tuta domo kaj ŝi vokis min,
ĉar nek ŝi parolis germane, nek la oficiro
konis alian lingvon ol la germanan. La
servistino sciis, ke mi paroletas ankaŭ la
germanan lingvon.

La oficiro estis serioza, sed kiam li
vidis, ke la „interpretisto” estas knabine-
to, li ekridetis kaj milde demandis min:

„Kie estas la familio, kiu loĝas en ĉi
tiu vilao?”

„Ili forveturis”, respondis mi, iomete
time.

„Kien?”

„Mi ne scias.”

„Kial?”

„Mi ne scias.”

„Ĉu ili estas judoj?”, akriĝis subite
lia voĉo.

Nur temperon mi bezonis, ke mi me-
moru pri la peto de la Sinjorino, ke ni
gardu ilian hejmon! Tuj mi sciis, ke al-

venis mia tempo, kiam eĉ mi povas iele
helpi. Konscie mi mensogis:

„Neee, ili ne estas judoj. Ili estas kris-
tanoj!”, mi diris kun senkulpa mieno.

La oficiro ironie ripetis mian antaŭan
respondon kaj firme diris:

„Ili estas kristanoj!”

Por subteni mian respondon, mi eĉ
faris la signon de la kruco kaj mi kun-
metis miajn manojn, kiel mi vidis ĉe la
katolikoj, ke la fingroj estas streĉe kun-
metitaj kaj supren tenitaj, ne kiel mi pro-
testantino kutimas, interfingrigite teni la
preĝantajn manojn.

„La knaboj en la romkatolika preĝejo
partoprenis la mesojn, kiel mesknaboj”,
mi daŭrigis mian „pledoparoladon”,
kaj mi ne mensogis, ĉar mi sciis, ke ili
fakte estas judoj, tamen multaj gepatroj,
ankaŭ nia najbara familio, kristaniĝis
tiutempe, kun la espero, ke ili savos la
vivon de siaj infanoj. Nur malmultaj el
ili sukcesis saviĝi.

La oficiro, ne ricevante de mi kon-
tentigan respondon, lasis, ke mi hejmen-
iru. Li jam ne ridetis. Serioze li staris
apud la grandega skribotablo, sur kiu
troviĝis tajpilo.

Mi eĉ ne konjektis, ke post semajno
ankaŭ nia familio rifuĝos kaj nur post
duonjaro ni hejmenvenos, vere, nur nian
vivon savante.

La rusoj kanonis nian urbeton kaj
kuglo de kanono trafis la subtegmenton
de nia domo. Ĝi ne eksplodis, sed deci-
digis mian Dolĉan Patron, rifuĝante savi
la vivon de la familianoj.

La alia timiga afero estis iu brilanta
objekto en la banĉambro. Dum mia ko-
reto bategis pro la timo de tiu konstanta
brueteto, subite ekaperis tiu brilanta ob-
jekto. Unue mi pensis, ke la brueto kaj
la brilanta objekto estas koneksaj. Sed ĝi
tamen ne estis tiel timiga, ĉar ĝi staris
senmove.

Intertempe hejmenvenis miaj gepa-
troj kaj mi eksentis la sekurecon. Ili kre-
dis, ke ni delonge dormas, kaj mi silente,
sed feliĉe kuŝis en mia liteto. Mi ne vo-
lis, ke ili eksciis, ke mi sendorme atendis
ilian hejmenvenon. Forte mi sentis, ke
mi jam sendanĝeriĝis.

Jaroj kaj jaroj pasis. Ofte mi pensis
pri tiu simpla, mistera nokto, sed nur
post longa tempo mi divenis, kiuj estis
la timigaj kaŭzoj.

La brueton kaŭzis la tajpado en la
najbara vilao. Kiu scias kion tajpis la di-
rektoro malfrunokte?

La brilanta objekto estis eĉ pli pro-
za afero. La plenluno, tra la banĉambra
fenestreto, lumigis kaj briligis la tie sta-
rantan porcelanan noktovazon.

Júlia SIGMOND



Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉielo

“Nekutime leginda verko”

Donald Broadribb



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Serio Stafeto n-ro 32
Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 333 g,
288 paĝoj, ISBN 978-90-77066-33-1;
prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko.

Kiel e-libro (PDF): prezo ĉe FEL: 13,50 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

anoncetoj

Beneluksa kongreso okazos inter la 13a kaj 16a de majo en Antverpeno (Belgio). Petu aliĝilon kaj informilon de Flandra Esperanto-Ligo, Beneluksa kongreso, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Vizitu Iperity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 2200 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iperity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0259-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO

12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>



**enciklopedieto
kun informoj kiel
telefoni el kaj al
eksterlando**

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2010

via poŝamiko dum la tuta jaro 2010



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)